Михаил Лермонтов,

# La anĝelo

*tradukita de Boris Mirski*

Kun kanto solena en nokta ĉiel'
Sin portis mirinda anĝel';
Kaj luno, kaj steloj, kaj nuboj en rond'
Atentis la himnon de l' mond'.

Li kantis pri vivo sen zorga ĉagren'
Sub branĉoj de pura Eden';
Kaj laŭd' al keruboj, al granda Sinjor'
Elflugis sincere el kor'.

En brakoj animon li portis al ter',
Al mond' de malĝojo, mizer';
Kaj restis la kanto en juna anim'
Sen vorto, sen unu esprim'.

...

Михаил Лермонтов,

# Anĝelo

*tradukita de Vasilij Devjatnin*

En mezo de nokto, en blua ĉielo,
Traflugis kaj kantis plej bela anĝelo.
Kaj nuboj kaj steloj kaj lun' en irado
Atentis kun ĝojo je l' sankta kantado.

Li kantis feliĉajn, neniam pekantajn
Spiritojn, kun Di' en ĉielo loĝantajn;
Li kantis pri Patro ĉiela kaj tera—
Kaj lia laŭdado ne estis malvera.

Animon tre junan en brakoj li tenis;
En mondo malgaja naskiĝi ĝi venis.
Kaj sono de l' kanto en juna animo
Restadis sen vort', sed kun viva estimo.

...

Михаил Лермонтов,

# Der Engel

*tradukita de N. N. 98*

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Михаил Лермонтов,

# The Angel

*tradukita de N. N. 97*

At midnight an angel was crossing the sky,
And quietly he sang;
The moon and the stars and the concourse of clouds
Paid heed to his heavenly song.

He sang of the bliss of the innocent souls
In heavenly gardens above;
Of almighty God he sang out, and his praise
Was pure and sincere.

He bore in his arms a young soul
To our valley of sorrow and tears;
The young soul remembered the heavenly song
So vivid and yet without words.

...

Kaj plena je stranga, mirinda dezir'
Ĝi vagis en mond' de sopir',
Kaj tedis al ĝi post la kant' de l' eter'
La veaj motivoj de l' ter'.

*Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de* Михаил Лермонтов *(*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de Boris Mirski.*

*Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en* `http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html`.

Tre longe en mondo ĝi estis premata,
Je revo mirinda pri Di' plenigata!
Kaj ŝanĝi la kanton de l' sankta sincero
Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj de l' tero.

*Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de* Михаил Лермонтов *(*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de* Vasilij Devjatnin *(*1862 – †1938).*

*Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipediejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin`.

*Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de* Михаил Лермонтов *(*1814-10-15 – †1841-07-27) en la Germanan de N. N. 98.*

*Arg-1039-2112 (2014-06-03 17:30:50)*

*Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en la retejo* `http://maschas-buch.blogspot.de/2011/09/lermontov-der-engel.html`. *Vidu ankau:* `http://home.arcor.de/berick/illeguan/lermont1.htm`.

And long did it struggle on earth,
With wondrous desire imbued;
But none of the tedious songs of our earth
Could rival celestial song.

*Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de* Михаил Лермонтов *(*1814-10-15 – †1841-07-27) en la Anglan de N. N. 97.*

*Arg-1039-2111 (2014-06-03 11:29:07)*

*Tiu ĉi laŭvorta poem-angligo troviĝas en* `http://max.mmlc.northwestern.edu/~mdenner/Demo/texts/angel.html`.